

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

April 1943

31 årg. Nr 4

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Ett är nödvändigt!

Denna rubrik är hämtad ur bibeln och berör ett helt annat område än det, som här helt kortfattat kommer att behandlas, men enär detta senare är viktigt nog, så väljes nämnda innehållsrika uttryck som lystringsord även härför.

Ämnet är tidigare berört i vår tidning, men då av allt att döma det sagda är att förlikna vid de sädeskorn, som föll på vägen, och som fåglarna åt upp, så kanske en ny erinran kan vara på sin plats.

"Inte kan en stad döljas, som ligger på ett berg", står det på ett annat ställe i den gamla goda boken. Ifall man skulle överföra eller tillämpa detta uttryck på vår esperantorörelse, så blir väl tillämpningen den, att om vi lyfter, bildligt talat, vårt ståndar högt samt värdera och hänföras av det mål, esperantorörelsen arbetar för, samt dessutom själva hjälpa till i detta arbete, så måste resultatet bli, att vår omgivning, vår bekantskapskrets, får i någon form kontakt med esperanto på ett helt annat sätt, än om vi syssla med esperanto mer så att säga i skymundan och endast för oss själva.

Arbetet för esperanto kan naturligtvis ske på olika sätt. Här skall dock beröras endast ett sådant, det nämligen att vid vår korrespondens å kuvertet eller omslaget anbringa ett esperanto-"Giv akt!" i form av ett esperantomärke. Detta är så lätt gjort och kostar så litet och har dessutom den fördelen, att alla esperantister, även de mindre försigkomna, kunna vara med. Esperantoförlaget tillhandahåller dels enklare märken till det billiga priset av ett halvt öre per styck och dels något dyrare sådana av mer konstnärlig typ. Ett annat sätt är att skaffa sig kuvert med någon esperantosentens.

Låt oss utföra ett litet enkelt räkneexperiment! Vi antaga att i Sverige finns exempelvis 4000 esperantister, och att var och en sänder, medeltalsberäknat, 25 postförsändelser (brev, brevkort, vykort, jul- och nyårskort m.m.) per år, och att var och en sätter ett esperantomärke av något slag på alla sina postförsändelser. Detta skulle betyda, att 100.000 sådana försändelser under ett år bleve postbehandlade. Och detta i sin tur skulle innebära, att en stor mängd människor ideligen finge en liten påminnelse om esperanto. Först alla posttjänstemän vilka expediera och bära ut posten. Vidare alla de skolbarn på landet, som hämta hem föräldrarnas och

grannarnas post vid återvändandet från skolan och slutligen alla adressater med familjer. Man bör ej heller förbise alla de tillfällen till samtal om esperanto, som dessa små märken på postförsändelserna säkerligen skulle ge upphov till samt därav följande beslut hos många att lära sig språket.

Vi böra följaktligen ej negligera eller försumma dessa enkla medel att propagera vårt språk. Tyvärr är det många även framstående och tongivande esperantister, som dock göra detta, dubbelt eller mångdubbelt beklagligt därför, att de enkla "männen i ledet" vanligen se upp till sina ledare och följa deras exempel.

Zamenhof talar i sin vackra och innehållsrika dikt "La vojo" om de små vattendropparna, vilka genom sitt oupphörliga fallande till slut urholka själva granitklippan. Han säger även några tankvärda ord om hoppfullheten, envisheten och tålmodet, dessa egenskaper, genom vilka man kan trotsa ödets slag och människors hån och gå sin väg rakt framåt för att slutligen nå målet. Han talar slutligen om andliga torketider, då grönskan vid vägen vissnar, då tusentals utsädda frön förstöras, och då allt arbete synes vara förgäves. Men han manar ändå till uthållighet i den förvissningen, att kommande släkten ska välsigna oss för vår klarsyn beträffande framtiden och för vår vilja att aldrig släppa taget.

Låt oss alltså, samtliga esperantister, under dessa för alla ideella strävanden svåra tider fylla åtminstone den lilla "arbetsplikten" inom vår rörelse att alltid vidfoga å våra postförsändelser något slags esperantomärke för att därigenom utåt visa, att vi stå eniga, att vi energiskt vill någonting, att vi bära vårt ståndar högt!

DETTA ÄR NÖDVÄNDIGT!

Hjalmar Kihlberg.



*På sid. 27 återfin-
ner ni prov på olika
reklammärken.*

OSARKRAK. I.

Verkis Albert Engström. Tradukis Paul Nylén.

Antaŭ kelkaj jaroj eŭropano travintris ĉe la eskimoj, la plej norda popolo de la tero.

Tio estis tiom pli facile al li, ĉar li havis eskiman santon en siaj vejnoj kaj parolis ilian lingvon. Cetere lia kulturo estis moderne eŭropana.

Li estis filo de pastro en suda Grenlando kaj estis vivanta tie sian unuan junaĝon. Sed eĉ al sudgrenlandanoj la polusaj eskimoj estis konataj nur laŭ legendoj. Iliaj fabelrakontistoj parolis pri mirinda popolo malproksime en la nordo, kiu vestas sin per ursfeloj kaj manĝas viandon krudan. Sed neniu el la rakontantoj renkontis homon kuraĝintan iri tiel malproksimen norde, ĉar la lando tie estas fermita per glacio kaj la suno neniam suriras.

Tiuj legendoj neniam lasis lin kvieti. Ili estis en liaj sonĝoj tage kaj nokte kaj, kiam viro, li decidis serĉi la popolon de la nordo. Li estis mia gasto kelkan tempon ĝuste kiam la decido maturiĝadis. Ni provis ludi eskimojn en kanoto, ĉar mankis al ni kajako.

Li lernigis al mi la manieron de grenlandanoj ŝteliĝe ataki fokojn, logi molanasojn kaj mevojn — ĉar el la flugplumoj de mevo oni tranĉas la plej fortikajn antaŭfadenojn por fiŝkaptaj hokoj*. Viron oni povas levi per ili.

Kaj foje mi faras al mi amuzon kaŝiĝi en montfendo sur la plej ekstrema marroko, svingi per mevoflugilo, kriante trrrrrr, trrrrrr tiel ke la sono krakadas super la maro.

Li lernigis al mi rampi el kajako en ŝvelondado, tranĉi neĝblokojn por domo kaj fari fortikan rimennon el tuta fokhaŭto kaj ĝin prepari, sed tiun ĉi procedon mi prefere ne priskribos.

Kaj jen li iris al Grenlando.

Kiam li ree venis hejmen, lin akompanis Osarkrak, kaj pri ĉi tiu li rakontis tion, kion mi nun volas skribi.

Li mem verŝajne opiniis tion negrave kompare kun aliaĵo, kiun li travivis. Sed tiel mi ne faras, kaj pro tio mi volas savi ĝin el forgeso. Ni povas nomi mian informinton Knud.

Kiam li vivis unu jaron kun la poluseskimoj, ĉasante ursojn, rosmarojn, fokojn kaj boacojn kun ili, partoprenante en murdoj je balenoj kaj narvalo kaj malviglante kun ili dum la longa polusnokto, venis al li la hejmsopiro samtempe kun la ruĝiĝo, kiu antaŭanoncis la printempan sunon malantaŭ la neĝkovritaj alpoj kaj glaciejoj. Li komencis fari preparojn por hejmvoyaĝo. Oni devis bone taŭgigi la glitveturilojn, elekti hundojn kaj aranĝi milon da gravaj detaloj.

La amiko de Knud — Osarkrak, sovaĝulo 25-jara, dum kelkaj tagoj iradis enprofundiĝinte en pensoj. Ili estis bonaj amikoj. Kune ili penetris en hundsledo kiel eble plej norden, sur la marglacio, sur glaciarioj, supre sur la landglaciego. Ili dormis kune en montfendoj kaj glaci-kavoj, malsatis kaj manĝegis en samaj cirkonstancoj, kaj jen ili disiĝos.

Sed unutage io ŝajnis esti maturiĝinta interne de Osarkrak. Kaj li diris: — Jen mi montris al vi mian landon, nun montru vi al mi la vian!

Ĉi tion Knud ne antaŭkalkulis, sed laŭ la eskima sento de takto tio estis tute ĝusta, kaj li ne povis rifuzi.

Li ja provis doni al Osarkrak imagon pri la eŭropa socio kaj la ideo "urbo", la kulturkampano kun arbaroj, plugkampoj kaj mirindaj bestoj ĉiuspecaj, ĉevaloj, bovoj kaj bovinoj, ŝafoj kaj porkoj, sed samtempe li estis konvinkita, ke la sovaĝulo nur pro ĝentileco ŝajnis kredi tiajn legendojn — ĉar la eskimoj estas tre ĝentilaj. Nun li ja kuniros kaj povos konvinkiĝi pri la vereco de la fabeloj de la eŭropano, kiuj estis multe pli fantaziaj ol tiuj de la grenlandanoj mem, kiuj temis pri la danĝeraj, tornit, fabelaj estaĵoj, kiuj loĝas, tion kredas la grenlandanoj, la internon de la lando, aŭ inuarudligkat, pigmeaj homoj, kiuj povas mortigi, nur fingromontrante la celon, aŭ erkigdlit, kiuj havas subkorpon de hundo, aŭ la amarok, besto granda kiel montego, aŭ gigantaj vulpoj kaj leporoj, kaj milo da aliaj mistikaj estaĵoj — kaj antaŭ ĉio pri magiaĵoj kaj aliaj grandfaroj, praktikataj de iliaj angakut, sorĉistoj kaj pastroj, kiuj scias liberigi siajn animojn el la korpoj kaj transloki ilin kien ajn ili volas.

Osarkrak akompanis Knudon en Eŭropon. Li nenion

*) Antaŭfadeno; svede "tafs".

supozis pri la elspezoj kiujn li kaŭzos, ĉar polusaj eskimoj ne scias, kion signifas mono. Ili eĉ ne praktikas intersanĝan komercon, sed ĉiu mem sin helpas, kaj tiu, kiu estas netaŭga ĉasisto, pereas.

Kiam Osarkrak el la granda kajako, la vaporŝipo, metis siajn piedojn sur la kajon de la grandurbo, li ekterurigis. (Daŭrigota.)

Kie vi estas?

Karaj Svedaj Amikoj!

Kara Gustavo!

Kiel blanka kolombo alvenis la letero, kiun vi sendis al mi kaj kiam mi legis ĝin larmoj venis en miajn okulojn pro tio, ke la malproksimaj jaroj kaj la teruraj mond-okazintaĵoj ne viŝis for la belan memoron de la kune pasigita tempo. Mi dankas al vi, karaj amikoj, ke vi pensis pri mi kaj ke vi skribis al mi ... Kiam mi malfermis la koverton kaj elfalis el ĝi la malgrandaj leteroj kaj artikoloj, kun tremanta mano mi ne sciis kiun el ili legi unue ... Mi alprenis do ĉiun kaj mi tiel sentis kvazaŭ tutan Svedujon, mian duan patrujon, mi estus ĉirkaŭpreninta, la landon, kiun mi fermis en mian koron kaj neniam forgesos ...

Bone mi memoras ankoraŭ pri la kune pasigita tempo, kiam la 20-gradan malvarmon vi faris al mi pli eltenbla per la varmo de via amika koro kaj mian mankantan hejmon vi anstataŭis per neniam forgesebla subtileco kaj delikateco. Tiel fariĝis via bela, pura patrujo mia dua hejmo kaj via honesteco kaj sincereco la brilanta ekzemplo de la supera Homo ...

Kaj nun mi rakontus al vi, de tiu tempo de kiam mi forlasis vian landon kaj la vagonaro veturigis min al mia hejmo, al Hungarujo, de tiu tempo ĝis nun multe multe da aferoj okazis kun mi kaj ĉirkaŭ mi ... Mia patro mortis, pro tio mi devis hejmenveni. Mian malsanan patrinon mi ne povis lasi sola. Mi estis ŝia apoganto kaj konsolanto post la grava sortobato ... sed ŝi ne povis elteni ĝin. Ŝi tiel malfortiĝis, ke antaŭ jaro ankaŭ ŝi mortis. Dumtempe mi edziĝis, plurfoje mi estis soldato kaj nun mi vivas ĉi tie en tiu granda mondbrulego tiel, kiel eble vi tie norde ... Multe, tre multe mi pensas pri la urboj kaj regionoj, kie mi estis. Ĉie mi akiris bonamikojn, kies ridetantaj okulojn mi vidas tra la maroj, montoj kaj kontinentoj, kiel ili rigardas min kun amo kaj varmece ... Kaj tiam ankaŭ mia koro pleniĝas per sunbrilo kaj paco, kaj mi esperas, ke ankoraŭfoje eble mi povos eniri tra la malfermita pordo de Svedujo kaj mi povos montri al mia edzino la landon, kie mi estis tre-tre feliĉa.

Estis al mi tre agrable, ke vi pensis pri mi, kaj feliĉa sento plenigas min pro tio ke la ondoj de la muziko donis al vi la memoron pri mi ... Nun, kiam mi skribas tiun ĉi leteron, mi vidas antaŭ mi, el la malproksimo de forpasintaj jaroj la svedajn amikojn, al kiuj mi parolis esperante kaj mi bone memoras pri la momento, kiam el la radio aŭdiĝis la Hungara Rapsodio n-ro 2 de Franz Liszt ... Mia koro batis laŭte pro la konata melodio, kaj mi deziris per sorĉo vidigi al vi la feinan ĉarmecon de la hungara ebenaĵo kaj ĉefe tiun varman sunbrilon, kiu en Öbacka en la vintro de la jaro 1934 de nia Sinjoro tre mankis.

Ankaŭ vikle mi memoras ankoraŭ pri la epizodo de la stacidomo. Tion, kion mi vidis kaj travivis en Svedujo donis al mi riĉan scion kaj klarigis al mi multajn erarajn pensojn. En ĉiu lando poste, kie mi estis, mi ne forgesis paroli pri vi, karaj amikoj ... De tiam, de kiam mi forlasis vian landon, ĉiam pli kaj pli vivas en mi la sopiro, ke mi denove revidos vin ... Kelkfoje mi pretigis min vojaĝi al vi, sed ĉiam intervenis io, kio malhelpis. Fine ekbrulegis la Mondo! kaj ĉesis per unufojo mia bela sonĝo ... La flaŭtaj melodioj de la belaj hungaraj rapsodioj droniĝis en la bruegon de la milito, nur kelkfoje de la profundo de mia animo mi aŭdas dolĉajn melodiojn tiam, kiam momente silento ĉirkaŭas min, kaj milde apersa antaŭ mi la svedlandaj memoroj.

Antaŭ nelonge oni prezentis ĉi tie en Budapeŝto en iu kinoteatro svedan filmon kaj mi ĝoje rigardis ĝin. Tre

För Edra brev!



SEF:s Propagandamärke

Trefärgstryck.

Pr 100 st. 2.70
inkl. oms. och porto.

Reklam- etikett

för brev,
tändsticks-
askar och
annan
propaganda
100 st. 1.10
inkl. oms
o. porto.

Propagandamärke

med grön stjärna på vit
botten, gummerat. Mycket
användbart.

100 st. 0.60 inkl. oms. och porto.

Insänd gärna likvid i frimärken.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.



bela serioza historio ĝi estis, vera arta ... Poste baldaŭ mi ricevis vian karan leteron, pri kiu nun mi respondas.

Vi demandas min: "Kie vi estas?"

Mi respondas: Jen ĉi tie mi estas, ankoraŭ mi vivas kaj mi esperas iomete, ke eble-eble foje tamen mi ekveturos kaj mi vizitos vin, miaj karaj svedaj amikoj.

Kun samideana amo
Tibor Czitrom

Malgrando jubileo.

La 1-an de aprilo nuna Sveda Esperanto-Federacio havis kaŭzon por festi ian dekjaran datrevenon. Ĉar de tiu dato SEF ricevis kaj konstante havas propran oficejon. Kelkaj energiaj junuloj stokholmaj iniciatis tiun entreprenon, kotizante mem monon por tiu celo kaj instigante aliajn esperantistojn same agi. De la 1-a de aprilo 1933 oni luis do en Fredsgatan 4, VI malgrandan ĉambron por sekretariejo de SEF. Aŭtune de la sekvinta jaro 1934 la oficejo translokiĝis al Drottninggatan 18 (de la 15-a de septembro). Kaj en la printempo de 1937 okazis nova transloĝigo, nome al la nuna ejo ĉe Tegelbacken, kie SEF, kune kun Filia oficejo de IEL kaj ETK, de la 1-a de marto de la dirita jaro havas sian oficejon en la plej centra loko de la urbo. La adreso de la esperanto-centro do konstante estas ĉe Tegelbacken, Stockholm.

LIBROJ — GAZETOJ

kaj aliaj eldonaĵoj.

Albumo-Adresaro de bulgaraj kaj eksterlandaj geesperantistoj 1942. Ricevebla per La Eldona Societo. Prezo 2:50 afrankite.

Kiel vigliga lumstrio en la mallumo venas tiu libro el sudorienta Eŭropo. Meze en furiozanta milito niaj samideanoj tie kuraĝe entreprenis la eldonon de libro, kiu eĉ en paca tempo estus respektinda. 136 paĝoj plenaj de interesaj kaj instruaj informoj, montrante, ke Esperanto malgraŭ ĉio vivas!

Maloftaj kaj malmultaj estas ja la informoj pri la movado eksterlande. Des pli bonvena estas tiu verko, kiu donas klaran bildon de la esperantista vivo en du militantaj landoj — Bulgarujo kaj Hungarlando. Aro de portretoj, interesaj artikoloj pri diversaj temoj kaj multaj bildoj ilustras la libron.

Interesa estas la informo pri la fondo de "Propaganda fronto" en Hungarlando, sekvinda ekzemplo ankaŭ por ni.

Eĉ Svedujo ricevis du-tri paĝojn, montrante parte la intereson, kiun nia lando certe nun altiras en la militantaj landoj, parte la aktivecon de niaj gotenburgaj samideanoj, kiuj tute regas tiujn paĝojn!

La honoro por la eldono de tiu verko apartenas sendube al s-ro Dimitr Ivanov, kiu iniciatis, aranĝis kaj malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj eldonis ĝin.

Kelkaj preseraroj malbeligas la libron, sed ili estas zorge kolektitaj en la fino de ĝi.

R. Pehrsson.

ALEKSANDRO CSOMA.*

1819. Eŭropo ankoraŭ ne povis vekigi el la inkubo de la napoleonaj militoj. La vundoj ankoraŭ sangis kaj doloris. Inter la orient-karpataj montoj tridek-kvinjara viro vivis song-vivon. Li songis pri sciencaj sukcesoj, li songis pri malkovroj. Obstine li pelis siajn songojn. Li ne volis malpli, ol trovi tiun branĉon de la hungara popolo, kiu antaŭ kelkmil jaroj disiĝis de la alia, restanta ie en la profundo de Azio. Kaj tiun volon sekvis brila scienca vivvojo, impona, stranga, martira, admirinda. Csoma havis apenaŭ iom da mono, kiam li ekiris al sia ekspedicia vojaĝo kaj lia ekspedicia provizo ne estis multe pli, ol la korpon kovrantaj vestoj. Kaj preskaŭ nur piede li transvagis la tutan Orientan Eŭropon, Azion kaj atingis fine Tibeton, kie malaro haltigis lian formike ageman spiriton. Li ne atingis sian originalan celon kaj ne retrovis la praan landon de la hungaroj, sed liaj studoj kaj rezultoj koncerne la tibetan lingvon kaj la historion de Tibet, liaj esploroj koncerne la originon de lia mezeŭropa popolo, liaj heroaj persistaj klopodoj, kiel esploristo, estas neforgeseblaj, ekzemplodonaj. En tiu ĉi kapoperdinta mondo estas inde noti, ke angloj enterigis lin en Dargiling kaj anglaj aŭtoritatoj kaj institucioj eternigis lian memoron ankaŭ por la ĝenerala publiko, starigante lian statuon kaj fiksan memortabulojn pri li, pri la fondinto de la orienta filologio.

Pri tiu heroo de la scienco rakontas al ni la 6-a kajero de la Hungara Esperanto-Federacio; ties 16 paĝoj estas interesa legaĵo kaj laŭdas la seriozan fervoron de la aŭtoro, J. Mihalik. La materialo de la rakonto estis ja tre vasta kaj estas lerte koncizigita. Estus fabele, se pacpropagando — ĉar tia libreto estas eĉ sen aktualaj koncernigoj pacpropagando — povus esti pli ampleksa, sed nun oni devas ĝoji, ke entute aperas bona verko, kun interesaj fotoj kaj plejparte aludanta kaj sopiranta al la unuigo de la, ĉi-momente tiel malprudenta homaro.

F. S.

*) Aleksandro Csoma de Körös. Verkis: Josefo Mihalik de Hernádszurdok. Eld.: Hungara Esp. Federacio, Sashalon, 1942. 16 paĝoj.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

kallas härmed till ordinarie årsmöte pingstdagen den 13 juni 1943 kl. 9 f.m. å Hälsingborgs rådhus.

Arenden enligt stadgarnas § 11.

Styrelsen.

SEIF Spalten.

FÖRBUNDSSEKRETERAREN.

Förbundet har till de fyra stora politiska partierna sänt en skrivelse med följande innehåll:

"Vid sitt senaste sammanträde beslöt styrelsen för Svenska Esperanto-Förbundet att väcka följande förslag:

Vi föreslå, att alla de stora partierna och övriga organisationer gå samman den 1 maj i år för att gemensamt demonstrera under parollen

För alla folks frihet och hela världens fred!

Vi föreslå att partierna i cirkulär rekommendera sina avdelningar på olika platser att ordna gemensamma demonstrationståg under denna paroll och inbjuda olika organisationer att med sina fanor delta.

I dessa tider av svåra orättvisor och jordmån för stegrat folkhat kan en sådan samfällid viljeyttring från vårt fredliga folk kanske något litet ge eko i andra länder och hjälpa dess folk att besinna sig."

Initiativtagare är borgmästare Lindhagen, som vid ett av Stockholms Esperanto-Förenings möten talade om: Esperanto och världsfreden — ett aktionsprogram.

Nu uppmana vi även våra klubbar att var och en på sin plats ta initiativ i denna fråga och hos de lokala partiavdelningarna föreslå sådana demonstrationståg samt lova sin medverkan.

*

Förbundsstyrelsen har beslutat att kollektivt ansluta Svenska Esperanto-Förbundet till den svenska kommittén av Världssamling för fred. Denna kommitté består av kollektivt anslutna riksorganisationer med ett sammanlagt medlemstal av över 1.200.000. Flera fredsföreningar och nykterhetsorganisationer äro representerade men även sådana organisationer som Landsorganisationen och Hyresgästernas Riksförbund äro med. Svenska Arbetare-Esperantoförbundet är redan anslutet.

*

Matrikel 1943 är nu duplicerad och innehåller adresser till förbunds- och distriktsstyrelsernas medlemmar samt till klubbarna. Den utsändes i tre ex. till varje klubb. De direkta medlemmarna komma att få den senare tillsammans med årsrapporten. Uppgifterna i matrikeln äro kanske inte till alla delar aktuella, men det är i så fall inte förbundets fel utan beror på bristande rapportering. Uteblivna avgifter ha medfört att några klubbar utslutits.

*

I matrikeln har inkommit ett fel. För sekreteraren i S. Älvsborgs Läns distrikt fattas namnet Hilding Elg.

*

Enligt förra förbundsmötets beslut bör tid och plats för följande års förbundsmöte kungöras ett år i förväg. Det är därför lämpligt, att de klubbar, som fundera på att stå som värdar nästa år, göra slag i saken och skicka in inbjudan snart.

S a l e x.

OMBUDSMANNEN

återvände hem till Örebro vid månadsskiftet februari-mars och förberedde sitt vårarbete och överlade om den finansiella ställningen för detta. Den 8 mars skedde avresa över Grästorps (med föredrag i Tengered) till Jönköping. Här började s-ro Morariu sin 6te årskurs vid Kristliga folkhögskolan — 20 lektioner. Den 16/3 deltog ombudsmannen i festligheterna vid fru Mattis Fejdes 50-årsdag och den 24/3 i fest med motsvarande anledning för fröken Frideborg Hultgren. Den 24—25/3 ägnades i övrigt Norrahammar, där föredrag hölls, och där ombudsmännen hade glädjen råka många "flue parolantajn samideanojn".

Den 26/3 randades kursavslutning i Jönköping, med stor anslutning och triumf för läraren.

Den 27/3 höll han föredrag i samskolan i Vaggeryd och återvände sedan till Jönköping, där "Konkordo" höll sammanträde den 28/3.



Esperantokurso de T. Morariu ĉe Jönköpings Kristliga Folkhögskola dum 10—26 de marto 1943.

O m b u d s m a n n e n s a d r e s s :

2 april föredrag i Komm. Flickskolan i Malmö,
1—7 april ĉe J. Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö.
9—15 april ĉe överlärare F. Almfeldt, Fack 3, Rödeby.

Klubbarna i Skåne och Blekinge ombedjas begagna dessa adresser.

Ombudsmannens program är t. v. ej hårdare belastat än sålunda:

8 april föredrag i Högre Allm. Läroverket i Lund,
3—7 april besök i Trelleborg, Ystad, Rynge,
9—15 april besök i Rödeby, Halleby, Ronneby.
18 april Borås.

Pasko en Örebro.

Post Pasko: Kil, Karlstad, Säffle, Amotfors, Uddevalla, Göteborg.

Meddelande från Esperanto-Institutet



Svenska Esperanto-Institutets sommaruniversitet 1943 i Lund-Malmö.

Tid och plats: Sommaruniversitetet äger rum under tiden 15—19 juni 1943 i Lund (2 dagar) och Malmö (3 dagar).

Föreläsare: Björn Collinder, Ernfrid Malmgren, Tiberio Morariu, Ella Nilson, Paul Nylén, John Stenström, Jan Strönne, Fr. Szilágyi och Karl Söderberg.

Sommaruniversitetet avser icke att vara en instruktionskurs i vanlig mening, utan föreläsarna komma att behandla de mest skilda ämnen.

Anmälningar: Kursavgiften är 10 kronor och insändes så tidigt som möjligt till institutets ombud Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, och bör rumsbeställning göras samtidigt.

Påminnelse: Reservera redan nu en härlig semestervecka i Skåne mellan pingst och midsommar. Endast 2 föreläsningar äga rum varje dags förmiddag, och resten av dagen ägnas utflykter, bad etc., varefter kvällen upptages av föredrag, samkväm, underhållning etc.

Examensskrivningar

höllos den 14 mars i Eslöv, Hälsingborg, Karlskoga, Karlstad, Kumla, Malmö och Amotfors. Malmö hade det ojämförligt största antalet examinander, nämligen 11 stycken, samtliga i högre examen. Det är nu tredje året å rad, som Malmö kunnat uppvisa de flesta examinanderna. Storslaget!

Institutet hade väntat sig examensanmälningar från många andra platser i landet. Nästa gång kanske!

Använd examenstexterna till övningstext. Priset är 10 öre pr st. Institutet ombesörjer även rättning av insända övningstexter mot erläggande av 50 öre i frimärken.



SEF:s årsmöte i Hälsingborg den 12-14 juni 1943.

Programmets huvudpunkter.

- 12/6 15.30 Kongressbyrån öppnas å Grand Hotel.
18.00 SEF's styrelse sammanträder å Grand Hotel.
19.30 Årsmötet öppnas å rådhuset.
20.30 Festsupé med dans å Grand Hotel.
- 13/6 9.00 Förlagsföreningen Esperantos årsmöte å rådhuset.
10.00 SEF's årsmöte å rådhuset.
12.30 Lunchpaus.
14.00 Förhandlingarna fortsätta.
18.00 Middagsrast.
19.15 SEF's teaterafton å Fredrika Bremer-lokalen. Efteråt samkväm i Öresundsparken.
- 14/6 9.15 Esperantogudstjänst i Mariakyrkan.
10.30 Kyrkkaffe å Terrassen. Besök i Kärnan.
12.00 "Ut i det blå". Rundtur. Lunch eller kaffe i Ramlösa. Avslutning.
- 15/6—19/6 Sommaruniversitet i Lund och Malmö.

Anmälningar:


Anmälningsavgiften, kr. 2:50, samt beställning av rum insändes till SEF-kongress, Hälsingborg. För att säkerställa hotellrum bör anmälan insändas så tidigt som möjligt och senast den 1/6 1943.

El Finnlando.

Esperanto-Societo de la finnaj fervojistoj

plenumis lastan jaron 20 jarojn. En la somero 1922 oni nome dissendis presitajn cirkulerojn tra la tuta fervojaro en Finnlando. Oni sciigis tiamaniere, ke en la lando ekzistas almenaŭ 50 esperantistaj fervojistoj aŭ almenaŭ, ke ili volas lerni Esperanton. Oni decidis "solene" akcepti eksterlandajn kolegojn, alvenontajn al la 14. Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki. La konduktora societo donacis por tiu celo 300 mk. Bone sukcesis la fervojista kongreso en la ŝtata domo kaj post ĝi oni decidis starigi specialan finnan fakansocieton en la kunveno de la stacidomo, kiun la ĉeĥoslovaka prezidanto de la kongreso konsideris la plej bela en la mondo.

La fervojista esperantista societo vivadis 20 jarojn sian silentan vivon, ĉar mankis fervojaj funkciaĵoj. Tamen oni povas noti kelkajn belajn venkojn sur ties konto. La societo ricevis la rajton ĉiuvintre aranĝi 2 prelegojn pri nia movado por la junaj gekursanoj de la trafikaj apartoj en Helsinki. Tio estis jam la unua oficiala rekono de nia lingvo. Poste oni presigis adresaron de la esperantistoj, kiuj volas funkcii kiel gvidantoj por la fremdlandaj turistoj en diversaj pli malpli gravaj stacioj. La tabelon oni transsendis per la Reklamoficejo de la administracio de fervojoj al ĉ. 100 stacidomoj. La tabelo ofte bone servis al eksterlandanoj, kiuj antaŭ la vintra milito kelkfoje karavane alveturis Finnlandon. La ĉefdirektoro de la ŝtata fervojoj, prof. J. Castrén donis ankaŭ la permeson porti la esperantistan signon sur la uniformo de la fervojistoj, kiam la mondkonata aŭstra esperantisto, ĉefdirektoro Hugo Steiner vizitis Finnlandon. Kiam la fervoja administracio ekanĝis lingvajn kursojn por la fervojistoj por la planita Olimpiado, ĝi permesis ankaŭ nian lingvon kiel lernobjekton. La prezidanto de la societo verkis amason da priesperantistaj flugfolioj kaj broŝuroj kaj artikoloj por la gazetoj kaj prelegis en diversaj lokoj de la lando. La societo posedas nun presitan korespondan kurson kaj atendas multajn fervojajn gelernantojn. Diversspecaj flugfolioj



Esperanto-elmontr-ejo ĉe librovendejo en Strängnäs, aranĝita de lektoro Beckman.

estas dum 20 jaroj distribuitaj amase por la fervojistoj kaj alia publiko.

En sia jarkunveno la 28-an de febr. oni elektis stacidomon H. Salokannel kiel prez., librotenisto Vuolanne kiel sekretarion kaj kasiston. Aliaj estraranoj: s-roj Y. Lindqvist, U. Aaltonen kaj T. A. Lindberg. Nova regularo aprobita kaj novaj laborplanoj por estonto faritaj.

H. S-1.

EL FRANCUJO.

André Védrine, Lyon, bedaŭras en sia raporto ke "pro la nunaj cirkonstancoj la francaj presadoj nuntempe ne povas iri de nia lando al via". Do la klubgazeto "Comprendre", kiu ni ĝis nun ricevis, ne plu povas veni al ni.

En la Lyona laborista gazeto "La Voix Ouvrière" (la laborista voĉo) Védrine skribis artikolon pri la nutroporcioj en Svedujo laŭ informoj ricevitaj per korespondado. Eble baldaŭ aperos samtema artikolo pri Finnlando.

EL SVISUJO.

Svisa Esperanto-Tago 28a de aprilo—2a de majo en Ascona.

Manke de Universalaj kongresoj la svisaj Esperantistoj kun granda ĝojo akceptis inviton de d-ro Ed. Privat jarkunveni en la rava vilaĝo Ascona dum la plej bela sezono. Tiĉino estas vere la svisa sunĉambro kaj la ĉiuprintempa celo de siaj amantoj. La afabla invito de d-ro Privat, la rava naturo kaj precipe la manko de kongresoj internaciaj vekis la deziron aranĝi ion eksterordinaran. D-ro Privat konsentis aranĝi printempan universitaton, dum kiu li prelegos pri Hindujo (lando, religioj, moroj), pri Gandhi kaj Tagore.

La svisaj Esperantistoj kun ĝojo atendas tiun kunvenon por esti informitaj pri tiom interesa lando de funda konanto de la hinda popolo.

KORESPONDADO.

TANK PA att den enda förbindelsen med esperantister i utlandet, som under nuvarande förhållanden kan uppnås, måste ske per korrespondens! Anteckna därför alla under ovanstående rubrik införda adresser, inled själv korrespondens och håll adresserna tillgängliga för klubbkamrater. De ge möjlighet till nytta och nöje och ge Er den övning i språket, varigenom Ni kan bli en god esperantist.

Några adresser: Manuel Arnaldo Marreiros, Portimão, Portugal; Koju G. Mircev, 21-jara, kaj Tenju St. Petrov, 19-jara, vilaĝo Drenovo, Harmanli, Bulgario; Jose Luis Navarro, str. Molino de Viente 2, I, Madrid, Hispanio; Hristo v. Peev, 9-jara, "V. Levski" 101, Karlovo, Bulgarujo; du francoj 17-jaraj, pere de H. G. Henriksson, fack 68, Malung.

EL TIRO:

"Por franca rifuginto, s-ro M. Mendlewicz, mi serĉas la adreson de f-ino Gertrud Lyunberg (?) de Stockholm. Ĉu vi eble povas ricevi ĝin kaj hazarde transdoni al mi?"

El letero de Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn (Schweiz).

Esperanto-semester vid Laxsjön.

Genom överenskommelse med ett pensionat i Dalsland i närheten av den blivande Nansengården äro vi i tillfälle att öppna möjlighet för svenska esperantister att tillbringa sin sommarsemester i kretsen av "samideanoj" om tillräckligt många intresserade anmäla sig före april månads utgång.

Ett välkommet tillfälle att få öva språket i otvungen samvaro med kamrater. Genom en erfaren esperantolärares ständiga närvaro erbjudes gästerna tillfälle att förbättra sina kunskaper i språket. Om det låter sig göra, kommer en särskild studievecka att anordnas för nybörjare under sommaren.

Tillfälle erbjudes också för de sommargäster, som så önska, att åhöra de föreläsningar, som under sommaren hållas vid Nansengården om efterkrigsproblemen av Nansengårdens ledare på platsen.

Naturen på platsen är idealisk: skog och sjö, berg och ängar i behaglig omväxling.

Pris: 7:50 kr. pr dygn.

Anmälan till: T. Morariu, Kyrkogårdsgatan 3, Örebro, eller Tulla Holfelt, 167, Amotfors, med noga angivande av vilken tid under sommaren vederbörande önska gästa pensionatet.

T. Morariu Tulla Holfelt
Sven Backlund.

Nansengården på Dal.

Esperantistoj — Gekamaradoj!

Esperantisto estas mondano, kiu volas esti frato al ĉiuj aliaj mondanoj sen penso pri gento, religio aŭ haŭtkoloro. Gekamaradoj, ĉu ni konscie laboras por realigi tian mondstaton?

Kion ni povus fari, vi demandas?

Ni svedoj, kiuj ĝis nun havis la feliĉon resti ekster la terura milito, devas iamaniere montri eksteren ke ni volas labori por helpi niajn malfeliĉajn fratojn militvunditajn. Kaj precipe do ni geesperantistoj devus esti la unuaj en tiu laboro.

Tiaj pensoj vekis la starton de nia monokolektado al estonta invalidhejmo Nansengården på Dal. En la jarkonferenco de Vermland-Dal 1942 Sven Backlund parolis pri la malfacilaĵoj lingvaj en la internacia laboro. Tie ni decidis esplori la utilon kaj neceson de esperanto en la internacia faksindikata laboro.

Sven Backlund verkis cirkuleron, kiun elsendis ABF, LO kaj ĉiuj faksindikataj asocioj. La respondoj al tiuj cirkuleroj nun envenis, kaj la rezulto de ili baldaŭ estos eldonata en broŝuro.

Nansengården estis fondita 1938 en Francujo de Sven Backlund kaj lia kolego, la franca profesoro Paul Desjardin en la nomo de la fama norvegano Fritiof Nansen. En malnova lernejo ordiĝis hejmo por la rifuĝintaj, senhejmaj hispanoj, precipe do por la virinoj kun iliaj infanetoj, en kiu ili ricevis prizorgon kaj flegon post la kruelaj travivaĵoj en la vundita, disbombita hejmlando Hispanio. Tiu hejmo ne plu rajtas funkcii en Francujo laŭ decido de la okupintoj.

Paul Desjardin mortis, kaj Sven Backlund decidis, ke Nansengården estu restarigata en Steneby, Dals Långed, Dalsland, en proksimo kaj aliĝo al la konata invalidlernejo Steneby Hemslöjds- och Verkstadsskola, kiun fondis rektoro Erland Borglund. En tiu lernejo multaj en- kaj eksterlandaj invalidoj lernis novan metion.

Do, nia monokolektado al Nansengården på Dal komencis en Vermland kaj ĝis nun ni ricevis 3.400 kronojn. Nun ni direktas nian alvokon al ĉiuj esperantistaj grupoj en Svedio: ĉu vi volas kunhelpi starigon de tiu hejmo, en kiu invalidoj el diversaj landoj havos eblon resaniĝi kaj lerni metion por poste sin mem vivteni?

Estas ankaŭ alia kialo pro kiu ĝuste ni esperantistoj devas kunhelpi la starigon de Nansengården. En konferenco en Dals Långed ni decidis fondi esperantan lern-

SVEDA KRONIKO

HALMSTAD. 25.2. La klubo jarkunvenis en la ejo de ABF. Post aŭdigo de estrara kaj revizora raporto oni elektis funkciantojn por la nova jaro. Estraro: John M. Ahlström, prez., Allan Bengtsson, sekr., John Nilsson, kasisto, Arvid Claesson kaj Sven Gustavsson anstataŭantoj. Kiel revizoroj funkcias Hugo Nilsson kaj Evert



Persson. Gazetraportanto fariĝis Ruben Enocson. Ekzamena komitato: J. Ahlström, R. Enocson kaj J. Nilsson. Inter pluraj decidoj estis i. a. decido pri dimanĉe-ekskursoj. Enocson prelegis pri sia nuna korespondado eksterlanda kaj montris lumbildojn. Post kaŭtrinkado kaj fotografado la vere agrabla kaj sufiĉe bonvizitata jarkunveno finiĝis.

24.3. La klubo aranĝis jarfestenon kun supeo kaj danco en hotelo Svea. Partoprenis ĉ. 30 personoj. Ni kantis multajn esperantokantojn. Tre agrabla vespero!

Rub en Enocson.

GAVLE. 29.1. La klubo jarkunvenis en kafejo Flora. El la jarraporto oni povas mencii, ke en la klubo komence de 1942 okazis tritaga kurso gvidita de la sin-

ejon en aliĝo al tiu hejmo, en kiu interesuloj povos lerni nian lingvon kaj interesi sin pri internacia interkomprenado.

Kompreneble ni kolektu monon ne nur inter geesperantistoj sed inter ĉiuj homgrupoj. Estus granda honoro por la esperantistaro sveda, se ni povus kunhelpi realigon de tiu humana afero.

Ni esperas ke nia voko ne restos neaŭdita, sed ke ni baldaŭ ricevos leterojn de multaj lokoj. Ni estas pretaj respondi.

Ni havas presitajn listojn en la sveda lingvo, sed ĉiu grupo, kiu volas starti monokolektadon ja povas mem laŭ sia decido verki listojn. Por havigi monon ni ankaŭ povas aranĝi festenojn ktp. La adreso estas: Tulla Holfelt, 167, Amotfors, kaj la ĝira n:o estas 9 70 01.

Tulla Holfelt.

La estraro de Sveda Esperanto-Federacio traktis la supran proponon pri starigo de invalidhejmo Nansengården på Dal. Ĝi trovis ke la ideo estas en plena akordo kun la plej bonaj intencoj de nia movado kaj tial varme rekomendas ĝin al niaj grupoj kaj membroj.

La estraro.

diko. La gvidanto lerte pritraktis temojn el la historio de la esperantomovado kaj la gramatiko esperanta. Dum la jaro la esperantolaboro pro la milito estis malfaciligitaj sed tamen la plejparto de la membroj regule kunvenis ĉiun duan semajnon. Dum la kunvenoj i. a. estis literatura studrondo sub la inspiriga gvido de gimnazia instruisto Arne Lenner. La studmaterialo printempe estis "Tri angloj alilande" kaj aŭtune "La homo kiun milionoj aŭskultas". Aŭtune la klubanoj ankaŭ sin dediĉis al la bonaj ekzercoj de Esperanta Studrondo.

Kiel estraro por 1943 estis elektitaj: Gösta Aström, prez., Albert Liljemark, vicprez., Sven Edenby, sekr., Signhild Johansson, vicsekr., Gunnar Wesslén, kasisto, Erland Holmqvist, bibliotekisto, kaj Greta Edenby, klubestrino.

Anstataŭantoj: Carl Müntzing, Victor A. Östlund kaj Arne Lenner.

Revizoroj fariĝis Gunnar Bengtsson kaj Wegga Hansson kun Ellen Holm kiel anstataŭanto.

4.2. Bone vizitata, gaja "knytkalas" en la knabinslojĉambro, Övre Bergsgatan 5. Prelego de T. Morariu pri internacia esperantokorespondado dum la milito. La lasta programpunkto de la valora vespero estis amuzaj societaj ludoj.

26.2. Nova vizito de la energia sindiko, kiu raportis — instige, interese kaj bonhumore — pri sia lasta ofica vojaĝo en norda Svedujo. G. A.

HISHULT. La verda stelo jarkunvenis la 16-an de marto 1943. La estrara rakonto montras, ke la klubo post la fondiĝo la 7-an de okt. ĝis la jarfino havis 6 kunvenojn. Dum la kunvenoj oni per interparolo, studado, legado kaj komuna kantado ekzercis nian lingvon.

La estraro por 1943: Malte Markheden, prez.-sekr., N. A. Isaksson, vicprez.-sekr., Thyra Lunnergård, kasisto. Revizoroj fariĝis Folke Nilsson kaj Axie Markheden.

Post lingva leciono sekvis komuna kantado kaj kaftrinkado. Fine s-ro Markheden montris kolorajn lumbildojn de suda Svedujo kaj de Germanujo.

M. M.

LA SKANIA DISTRIKTO DE SEF jarkunvenis dimanĉe la 21-an de marto en Hörby, sub prezido de Jan Strönne, Malmö, kaj ĉeestis multaj reprezentantoj de la diversaj kluboj en Skanio. Laŭ la jarraporto la pasinta jaro estis sufiĉe vigla. Oni aranĝis prelegseriojn, komunajn ekskursojn, esperantotagon en Lund ktp.

La nuna estraro aspektas jene: prez. Jan Strönne, Malmö, vicprez. Ossian Nilsson, Hälsingborg, sekr. Lennart Magnusson, Malmö, vicsekr. Clary Hansson, Malmö, kasisto Eric Fredin, Malmö, kaj Gust. Henriksson, Hälsingborg, Birger Johnsson, Hälsingborg. Anstataŭantoj iĝis Ture A. Edberg, Mölleberga, Frans Rasmusson, Malmö, W. E. Lindqvist, Eslöv, kaj Nils Persson, Lund. Revizoroj: Hilbert Hansson kaj Stina Persson, Malmö, kun John Fogelberg, Hälsingborg, kaj Maria Persson, Malmö, kiel anstataŭantoj. P.K. konsistas el Jan Strönne, Lennart Magnusson kaj Eric Fredin. Distr. studgvidanto iĝis Jan Strönne kaj prepara komitato por venontjaraj elektoj iĝis Ester Andrén, Malmö, John Fogelberg, Hälsingborg, kaj Hans Petersson, Lund.

La jarkunsido decidis aranĝi centran biblioteken laŭ nova sistemo kaj diskutis diversajn aranĝojn okaze de la SEF-kongreso en Hälsingborg. I. a. oni decidis peti la instituton daŭrigi la eldonon de Esperanta Studservo. La malmöa gazeto La Folio daŭre estos distrikta organo, kaj la estraro registros ĉiujn esperantistojn en la distrikto. La venontjara jarkunsido okazos en Eslöv.

Post la traktadoj okazis teatroprezentado de la Hörbyanoj, kaj fine F. Szilágyi parolis pri la temo: "12 landoj inter 2 militoj". Partopreninto.

JÖNKÖPING. Karaj samideanoj! — Kiam mi nun forlasas la estraron al kiu mi apartenis kiel prezidanto ek de la komenco de nia societo, mi volas transdoni mian sinceran dankon al tiuj amikoj, kiuj staris ĉe mia flanko, ĉiam pretaj min helpi. — Mi esperas, ke tiuj semoj, kiujn ni semadis, ne perdiĝu, spite al la tre frostiĝinta batalejo nuntempa.

Dankon al ĉiuj por ĉio farita!

Via Knut Jensie.

Jönköpings neutrala Esperantoförening, La Konkordo, höll den 18 mars sitt årsmöte. Till ordf. för årsmötet valdes herr Bror Svensson. 5 personer valdes att utgöra den nya styrelsen, vilken sedan skulle konstituera sig själv. Den nya styrelsen består av följande medlemmar: Fröken Astrid Svensson, fröken Karin Viktorsson, fröken Sara Rosenkvist, herr Valter Svennar, herr Bror Svensson. Till revisorer valdes herr Vilhelm Gustafsson och fröken Wasty Eriksson, samt till revisorssuppleant herr David Ekfält. Till ombud för förlagsföreningen och La Espero valdes fröken Sara Rosenkvist, till ombud för ABF fröken Wasty Eriksson och herr Bror Svensson, samt till ombud för IEL herr Martin Fejde.

Årsmötet hade besök av förbundets ombudsman, red. Morariu, som under kaffepausen underhöll medlemmarna. Styrelsen fick i uppdrag att ordna ett samkväm under medverkan av ombudsmannen.

KARLSTAD. Esperanta Societo de Karlstad jarkunvenis la 29-an de januaro. La estrara kaj revizora raporto estis prezentataj kaj malŝarĝo danke donata. Kvankam malfavoraj cirkonstancoj malhelpis pli vigran agadon, nia malgranda klubo vivas. La klubanoj, ne multnombraj sed tre agemaj, kunvenis ĉiun monaton dum la jaro, parte en la kafejo Linnéa, parte en la ejo de ABF, parte en la hejmo de la prezidanto por diskuti, kanti kaj deklami. Aŭtune ni komencis monokolektadon por Nansengården på Dal. Daŭrigan studrondon esperantan ni komencis aŭtune kun Gustav R. Johansson kiel gvidanto.

La estraro por 1943 estas: Gustav R. Johanson, prez.; Hugo Byström, vicprez.; Gustaf Granath, sekr.; Eric Ahlén, vicsekr., ĉiuj reelektitaj. Kiel kasistino estis novelektita s-ino Gurli Byström.

La agrabla kunveno finiĝis per kantado, deklamo de sinjoro Einar Nilsson el Herrljunga kaj surogattrinkado. Grenado.

LUND. 19.2. La esp.-klubo havis la jarkunvenon. Agadaj kaj revizoraj raporto estis aprobitaj kaj la estraro ricevis malŝarĝon pro sia agado.

La estraro por la jaro 1943: Fritz Bengtsson, prez.; Gustav Lidbjer, vicprez.; Edvin Falck, kasisto; Nils Persson, sekr.; Sigfrid Jönsson, vicsekr.; Sven Nilsson, bibliotekisto. Anstataŭantoj: Signe Weiland kaj Karin Hansson. Revizoroj: Hans Petersson kaj Nils Weiland. Redakcia komitato: Fritz Bengtsson, Edvin Falck kaj Gustav Lidbjer. Reprezentanto por Eldona Societo Esperanto: Gustav Lidbjer. Delegito de IEL: Hans Petersson. Post elektoj sekvis kaftrinkado kaj poste s-ro Szi-

Allmän förtjusning

har mött Stellan Engholms nya original

Maljunulo migras – Venĝo.

Du kamparaj noveloj.

Författarens förmåga att ta sina figurer på kornet är beundransvärd. De två små noveller är ett stycke svensk bygdeskildring, som kan mäta sig med de bästa i genren.

Kr. 1.75 (inkl. oms. o. porto vid förskottslikvid).

Kr. 2:— (inkl. oms. o. porto vid postförsk.-likvid)

Fyll i nedanstående rekv.-blankett och sänd in den redan i dag.

Till FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,
Fack 698, Stockholm 1.

Härmed rekvideras:

..... ex. Maljunulo migras — Venĝo.

Likviden uttages pr postförskott — insättes & postgiro 578 — sändes i frimärken.
(Stryk det som ej önskas.)

Namn:

Adress:

Postadress:

lágys faris lecionon en Esperanto, kiu estis komenco al daŭriga kaj komenca kurso, kiu okazos en Brandstationen. 15 personoj anoncis sin kaj renkontiĝas ĉiu-vendrede je la 19,30. Ili tre diligente partoprenas kaj progresas en la lingvo. La kurso daŭras ĝis Pentekosto. Nils Persson.

STOCKHOLM. La sveda sekcio de KELI havis sian jarkunvenon en Stockholm la 15an de marto. Prezidanto por la vespero estis pastro G. Furhammar, Falun. Pro la malbona nuna situacio kompreneble la plej multaj el la ĉeestantoj venis el Stockholm kun ĉirkaŭaĵo. Sed ke ni tamen ne estis forgesitaj diris al ni la multaj salutoj, kiuj alvenis en diversaj formoj el nia longa lando. Malgraŭ la milito ni havis kontakton kun Nederlando, Finnlando, Svisujo, Francujo, Hungarujo, Italujo, Argentino kaj Usono. Ni scias, ke la amikoj tie ĵetas siajn rigardojn al nia trankvila, de Dio benata lando, en fido je ni, kaj ni ne volas ke ili vane tion faru. Ni laboru laŭpove eĉ en tiu ĉi malfacila tempo. Se Dio estas kun ni, kiu do povas esti kontraŭ ni? Nia gazeto, "Dia Regno", kiun ni eldonas provizore en Svedujo, ankoraŭ trovas vojon al kelkaj ligoj eksterlande, sed la sveda sekcio tion pagas. Kaj ni volonte tion faras ĝis venos pli bonaj tempoj. La eldonejo ne vendis multajn librojn, sed tiam kaj tiam ni havas mendojn. Eĉ el Usono venis peto pri "La homo kiun milionoj aŭskultas".

La estraro nun konsistas el la jenaj personoj: G. Furhammar, Falun, prez., Anna Alamo, Stockholm, sekr., A. Hallin, Stockholm, Ivar E. Karlsson, Leksand, E. Carlén, Kumla, kaj krom la estraro Ester Mellden, kasisto. La kunveno estis entute esperdona kaj vigla kaj kiam A. Hallin finis ĝin per preĝo ni sentis ke ni estas pli riĉaj ol kiam ni komencis.

Anna Alamo.

Grupo Esperantista. 3.2. Ni studis la tekstojn 7 kaj 8 de Esperanta Studservo. 10.2. "Nepreparitaj parolantoj". 17.2. Ni studis la leteron 9 de Esperanta Studservo. Redaktoro Nylén gvidis. 24.2. Ni rakontis pri la plej plej interesaj leteroj, kiujn ni ricevis. Redaktoro Nylén rakontis pri gaja okazo je la gefianĉiĝo inter princo Gustaf Adolf kaj princino Sibylla. La gazeto Aftonbladet nome dum tiuj tagoj skribis ke la princo svatis al la princino en Esperanto. Okaze de tio redaktoro Nylén sendis gratulan telegramon en Esperanto kaj li ricevis de la gefianĉoj dankokarton, kiun li nun montris.

10.3. Red. Paul Nylén rakontis pri la diversaj ejoj en Stockholm, en kiu kunvenis la grupo ekde sia starto 1909.

17.3. Propaganda vespero. Fraŭlino Ekberg enkondukis la programon ludante printempan muzikadon. Post salutvortoj de la prezidanto ni komune kantis la Himnon. Urbestro Lindhagen parolis pri la temo: Esperanto kaj la mondopaco. Agadprogramo. En la enkonduko de sia parolado la urbestro menciis ke li dum la lastaj jaroj transdonis skribaĵojn al la sveda reĝo pri la mondopacaj problemoj kaj pri iliaj solvoj. Plue s-ro Lindhagen rakontis pri siaj interpelacioj en la sveda parlamento kaj pri siaj vojaĝoj diversloke en la mondo. El la agadprogramo ni povas citi: Manifestacio la 1-an de majo sub devizo: Libereco por ĉiuj popoloj, paco por la tuta mondo. La dua punkto temas pri kunfando de la diversaj Esperantofederacioj. Speciale la laborista kaj neŭtrala. Urbestro Lindhagen finis sian paroladon dirante ke la esperantistoj estas la salo de la mondo.

Dum la diskutado kiu nun sekvis poŝtestro Julin estis la unua parolanto. Li trovis la proponojn bonaj krom la propono pri la kunfando de la laborista kaj neŭtrala movadoj. Tio ne estas necesa, li opiniis. Ankaŭ redaktoro Nylén apogis la proponon pri manifestacio la 1-an de majo. Sinjorino Anna Alamo diris kelkajn vortojn pri la internacia korespondado kaj transdonis salutojn de amikoj en Francujo. Ĉar pli multaj parolantoj ne anoncis sin, la prezidanto deklaris la diskutadon finita.

Fraŭlino Ekberg kantis kelkajn kantojn inter kiuj oni kun ĝojo rekonis la negrokantojn en esperanta vestaĵo.

S-ro Malmgren en Esperanto rakontis pri la universala Esperantokongreso en Romo 1935. La prelego estis ilustrita per belaj lumbildoj. Fraŭlino Ekberg lerte interpretis.

Ĉirkaŭ la kafotasoj, kie ni nun kolektiĝis, oni povis aŭdi gajajn interparolojn. Fraŭlino Ekberg ĝojigis nin

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Box 698, Stockholm 1.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris Från 1943: helt år kr. 4:—, Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonpris: 20 öre pr mm. **Korrespondensannons:** 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

per poemoj de Gustaf Fröding kaj Bo Bergman. Redaktoro Nylén en paroladeto faris rerigardon pri la agado por Esperanto, kiun faris urbestro Lindhagen. La kunvenon vizitis 85 personoj.

24.3 okazis maskobalo en printempa humoro kun multaj belaj fantazi-vestoj. Dum paŭzo nia magiisto Sam-Sam prezentis kelkajn mistifikadojn.

Tg.

Sveda Instruista Esperanto-Federacio

(Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20
Telefon 14 93 43

Göteborg V
Postgiro 3 14 30

Svenska språket

lägger många fällor i vägen för nybörjaren, när han skall lära sig Esperanto. Det är inte så mycket Esperantos grammatik som är svår, utan svenskans. Detta har Esperantoläraren Henrik Seppik, välkänd från sina kurser här — nu enligt uppgift i koncentrationsläger — förstätt och försökt att avhjälpa i sin bok

Högre kurs i esperanto

Med en mängd belysande exempel, roande läsestycken och skrivövningar leder han läsaren med säker hand genom det svenska språkets labyrinter på samma gång som han på ett överlägset sätt förklarar alla de svårigheter som Esperanto erbjuder nybörjaren.

En utmärkt bok för den som vill lära sig både svenska och Esperanto!

Pris: förskottslikvid 3.35 med oms. o. porto
postförskott 3.75 med oms. o. porto.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,
Fack 698, Stockholm 1.

Sjung på esperanto

Och höj stämningen på Edra möten!

A I I S Å N G B L A D

med 16 populära sånger och visor på Esperanto
Kr. 0.10

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 698, Stockholm 1.

För sommarens cykelturer:

CYKELVIMPLAR

med esperantostjärnan 1:30
+ oms. och porto 1:55

Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1.

